**Le dernier jour.** Francesc Poblet et Jordi Solé présentèrent, le lundi matin, leurs livres *Berlin via morta* et *La syndroma dels estranys sons*. Puis, Ricard Jordana et Maria Dolors Macarulla le leur : *"La vida rai. La guerra mai"* : la vie c'est facile, la guerre jamais. Le livre, des poèmes illustrés, va de la guerre civile espagnole à la guerre en Irak. Alexandre Korjenkov évoqua encore Anton Tchekhov dont c'est le centenaire de la mort. Le congrès s'est conclu par un baquet, en présence des représentants de la municipalité, dans un restaurant de la ville.

C. G.-W.

## "C'est poignant", l'espéranto

■ Gentil Puig-Moreno a trouvé un livre d'Alfonso Martorell avec un épilogue, écrit par son fils Floreal, où il s'est "retrouvé". Il explique : "Quand il parle de ce qu'il a vécu dans son enfance à Toulouse, qui était alors considéré comme la capitale rouge des Republicains espagnols, ça m'a replongé dans ma propre enfance, vécue dans cette même ville jusqu'à ce que j'ai 18 ans". Cette rencontre espérantiste de Céret l'a touché, alors même qu'il avait préalablement quelques réserves. "Ça semble désuet,

utopique, l'espéranto, mais ça évoque tellement de moments historiques que c'est poignant. C'est en fait une langue marquée par l'internationalisme (Alexandre Korjenkov a dit pendant le congrès, citant Céret : Nous étions très loin les uns des autres et pourtant le même processus était engagé l'anarchisme, les réfugiés espagnols émigrés en France, les Catalans du sud militant pour l'espéranto dans le but d'échapper au franquisme... Tout cela semble décidément important à connaître".

**NDLR :** Pour les besoins de la mise en page, la photo a été coupée en deux (sur l'autre moitié, la table couverte de bouteilles...). Sur la photo on reconnaît quelques visages connus dans la fédération. A droite A. Korjenkov (rédacteur de « La Ondo ») et J. Le Puil.

# Edena Ceret

Joan Inglada

*Ĉu vi ne ĉeestis Jubilean Katalunan Kongreson de Esperanto? Bedaŭrinde! Tion ne forgesu estonte!*

**K**ia ĝojo trovi tiom da geamikoj en esperanta medio en Ceret! Plenplena da homoj surstrate ĉar, meze de aŭ kune kun la ĉiusemajna surstrata merkato, okazis ĉiujara florfoiro memore al forpasintoj. Ni kvar: mia edzino, novlernantino, esperantistino loĝanta ĉe nia urbo kaj mi mem, alvenis propraveturile kaj devis parki ĝin for de la centro de la vilaĝo kvankam nia hotelo kuŝis precize en la centro, tute apude de la kongresejo. Do ni, ŝarĝitaj per valizoj, bonŝance nur semajnfinaĵ kaj pro tio malmulte pezaj, devis trapasi grandan tumultan homamason, kiuj trankvile vagadis tra la bazaro.

La organizanta estraro alvenis per aŭtobuso elirinta el Barcelono kaj trapasinta Sabadell, sed subita telefonvoko sciigis min pri alvena malfruo pro trafikoŝtopiĝo.

Survoje al la hotelo ni renkontis gesamideanojn promenantajn sub la brila suno de tiu bela tago. Same okazis en la hotela akceptado kaj en la lifto.

Tuj poste ni iris al la urbodomo, kie devis okazi la urbestra akceptado. Tie ni renkontis gesamideanojn el la plej apudaj katalunaj loĝlokoj kaj okcitanajn kaj francojn. Ni salutis la plej konatajn unue kaj la aliajn iom post iom. Oni informis, ke la urbestro tre afable diris, ke ni ne zorgu pro la prokrasto, ĉar tiel li povos ankoraŭ labori iomete pli. Poste nova telefonvoko sciigis nin pri la tiel atendata alveno. Kelkaj iris helpi la sudalvenintojn kaj la aliaj restis ĉe la urbodomo atendente la eventon. Fine okazis la inaŭguro de la kongreso, dum kiu parolis la urbestro, la KEA-prezidanto kaj la prezidanto de la Kataluna Kultur-Centro de Vallespir. La urbestro regalis nin per lunĉeto kaj tuje ni ekiris al la kongresejo kaj tiuj lastaj alvenintoj al hoteloj kaj junulara restadejo. La tagmanĝo estis haose solvita pro la ĝenerala malfruo sed je la tria posttagmeze pli-malpli komenciĝis la kongreso, do akceptado kaj




disdono de dokumentoj –kun pico sur la akcepteja tablo–, la libroservo, la budo de Vinilkosmo kaj la unua libroprezentado katalunlingve de la dulingva libro –katalun-esperanta– pri la komenco de la esperanta movado en Katalunio. Interretaj rimedoj, eldonejo Limaco, rusa profesia redaktoro de esperanto-magazinoj kaj libro-eldonejo, ateliero por esperanto-instruantoj kaj tre belega muzika vespero, estis la sabataj programeroj. Dumnokte pluvis senĉese sed milde. Dimanĉe okazis prezentado de katalunlingva libro, kiu krompritraktas esperanton, prelego pri didaktiko de esperanta gramatiko, posttagmeze, vizito al la Modern-Arta Muzeo kun detala klarigado, en la franca bedaŭrinde, sed kun tre bona traduko al esperanto. Tie en la kongresejo, ateliero pri librobindado, prelego pri la komencaĵ jaroj de esperanto en Ruslando, dua parto de la ateliero por esperanto-instruantoj, prelego en la kataluna pri la situacio de la kataluna lingvo en norda Katalunio kaj postvespermanĝe reprezentado de la teatraĵo “Familia etoso”. Lunde matene ni alvenis al la fino per la prezentado de du pliaj katalunlingvaj libroj pritraktantaj esperanton kaj la prelego pri Anton Ĉeĥov en esperanto. Tuj poste ni iris al restoracio por kune bankedi.

Nun miaj impresoj: la kongreso estis kiel feliĉa insulo meze de oceana evolua mondo. Mi rezignas mencii nomojn, ĉar mi emas al civitanismo kaj tie ĉiuj homoj estis samgravaj. Mi havis la plezuron paroli kun multaj esperantistoj, t.e. instruistoj, kantistoj, verkistoj, komercistoj, butikistoj, studentoj, emeritoj, eldonistoj, oficistoj, komputikistoj, scenejartistoj, universitataj profesoroj, ĉiusecaj aktivistoj, esperanto-instruistoj, apotekistoj, dom-familiazorgantoj,

tradukistoj, ktp. Mi partoprenis interese gajn debatojn kaj fine, en la bankedo, ni estis ses homoj, inter ili la kunregisorino de la teatraĵo. Ni komentis la teatraĵojn kaj kion teatrumi signifas en Esperantio kaj en la ne-esperanta vivo; ni pritraktis elprononcadon, ritmon, voĉlaŭtecon, komedi-apartaĵojn kaj mil plurajn aliajn aspektojn. Plezurege, preskaŭ la edeno, al kio tre proksimas Ceret. Eble pro tio multaj artistoj elektis ĝin de antaŭlonge. □



*NDLR : pro la sama kialo kiel sur la antaŭa paĝo (spacomanko), estis fortranĉita parto de la foto, kie fakte aperas via servisto ! La teksto aperis en la lasta “Kataluna Esperantisto”, organo de KEA (Kataluna Esperanto Asocio). KE estas konsultebla rete .*  
 Kontaktadreso :  
 Ret-adreso : [kea@esperanto-ct.org](mailto:kea@esperanto-ct.org)  
 Ret-paĝo : [www.esperanto-ct.org](http://www.esperanto-ct.org)  
 Retlisto : [nia\\_listo@esperanto-ct.org](mailto:nia_listo@esperanto-ct.org)



## Por konkludi pri la Kataluna kongreso

Ni scias en nia federacio, pro la iama organizado de la nacia kongreso kaj de la UK, ke estas komplike organizi « grandan » kongreson . Ni povas rideti nun pri foiro, kiu malebligis parkumi proksime de la kongresejo, de akcepto sen akceptantoj, ktp . Pli ĝene laŭ mi estis la manko de kunlaborado por la preparlaboroj, la samtempa disvolvigo de interesaj programeroj, ktp . Sed tio estis malmulte kun la pozitivaj flankoj, kiujn respegulas la du antaŭaj paĝoj . Kompreneble estis agrable retrovi geamikojn de la alia flanko de la Pireneoj, aŭ de apuda federacio aŭ de nia federacio (partoprenis deko da membroj kaj vizitis la kongreson nekonataj esperantistoj, ekzemple tri el Argelès !). La etoso estis amika, la prelegoj bonnivelaj, la budoj allogaj (specialan dankon al Flo pro la ebleco auskulti muzikerojn), la vesperoj interesaj . Riĉa estis la bukedo da novaj libroj (en la kataluna), da novaj kompaktdiskoj (de Kaj Tiel Plu kaj de J. Le Puil (lia unua)) . Menciindas ankaŭ la gazetartikoloj en la loka gazeto, en « E-Info » kaj en « Esperanto » de januaro 2005 . Ne maltrafu la venontan transpirenean kongreson ; ĝi estos facile atingebla kaj ne daŭros tre longe . Vi ne bedaŭros ! Permesu al mi citi la antaŭparolon de Jean Amouroux por la dulingva libro de F. Poblet i Fejoo « Els inicis del moviment esperantista a Catalunya / La komenca esperanto-movado en Katalunio » : *Esperanto estas ĉies afero kaj ĉies propraĵo, eĉ se la motivo aŭ koncepto de ĉiu estas kontraŭa kompare al tiu de alia . Tion oni nomas toleremo . Dependas de ĉiu disflorigi kaj uzi esperanton laŭ sia prefero, por ke la estontaj generacioj povu siatempe festi multajn datrevenojn .*

J.H.



## Pluraj federaciaj ankaŭ partoprenis en oktobro alian aranĝon en Katalunio . Jen iliaj impresoj kaj por kompletigi artikolo el « Heroldo » (2061) :

Kiel ĉiujare, jam de 12 jaroj, okazis en Salou la internacia semajno de Esperanto, organizata de niaj amikoj Luis, Santiago kaj Salvador. Tiun-ĉi jaron, niaj geamikoj Jacqueline kaj Maurice ne partoprenis pro reedukado de Maurice en lozera reeduk-domo . Jorgo kaj mi, do vojaĝis kun Serge kaj Monique, kiuj havas komfortan aŭton C5 . Dank' al ĝi kaj la bona stirado de Serge, la vojaĝo estis agrabla kaj mallaciga . Alvenante en Salou antaŭ la tagmanĝo, kun granda plezuro ni revidis konatajn personojn kaj konatiĝis kun aliaj . Tuj ni dronis en la varma esperanta etoso . La hotelo San Francisco situas meze de tiu turisma urbo . Post la vespermanĝo, okaze de la unua interkonatiĝo, ne mankis kuketoj, aŭ dolĉaj, aŭ salitaj, ĉampano kaj moskatelo . Preskaŭ ĉeestis 80 partoprenantoj, inter ili multaj hispanoj kaj francoj, 4 geangloj, unu irlandano, unu litovino, germano, rusino, japanino...

Persone mi ne povas paroli pri la ekskursoj ; Jorgo kaj mi profitis tiun tempon por provludi teatraĵeton, pri kiu ni nur antaŭparoladis . Por prezenti niajn skeĉojn, helpis nin JiPe, kiu anoncis, kaj Christian de Wilde, kiu bele ludis buŝharmonikon inter la skeĉoj, kio permesis al ni ŝanĝi la kostumojn, trankvile . La teatraĵo daŭris iom pli ol unu horon kaj la regiona televido filmis nin . Sed la transsendon ni ne povis vidi, ĉar ĝi okazis post nia foriro .

Dum alia vesperfesto, kvarteto kantis, ludis gitaron, dum oni bruligis rumon « cremat » ; juna paro, li germano kaj ŝi japanino, gaje dancis kaj helpis la rumon plivarmigi la etoson . En tiu gaja etoso, grupeto havis tempon prepari kaj prezenti al ni karikaturnajn figurojn de kelkaj dungitoj de la hotelo .

Pri la unua premio je la nomo Ada Sikorska Fighiera, mi sendis dokumentojn por proponi Leo Lentaigne . Sed estis hispana esperantisto, Aŭgusto Casquero de La Cruz, kiu ricevis la medalon, de la prajraj manoj de Gian Carlo Fighiera . Li restis nur kelkajn tagojn, sed ni havis la tempon apreci lian akĉenton

Tiu semajno estis por ĉiuj veraj ferioj kaj ni gratulas la organizantojn de tiu internacia semajno .

J.B.



## Kulturo ĉe milda kataluna maro



En la bela mediteranea urbo Salou okazis 2-9 okt 04 la 12<sup>a</sup> Internacia E-Semajno de la Kulturo kaj Turismo. Duono el la cent partoprenantoj venis de eksterlande.

Post la dimanĉa inaŭguro, fare de la urbestro mem, Esteve Ferran i Ribera, estis unuafoje asignita la premio "Ada Sikorska": ĝin gajnis la ne ĉeestanta Aŭgusto Casquero pro sia plurjardeka sindediĉa E-agado.

La Semajno gastigis sep prelegistojn. Unuavice Manuel de Seabra, PEN-membro, pri *Literaturo en Eo aŭ per Eo kaj esperanta aŭ peresperanta kulturo*. Ekster Hispanio ne multaj scias, ke Manuel de Seabra aŭtoris la bonegan prezenton pri nia originala literaturo en la fama enciklopedio Espasa-Calpe.

Kongrue al la turisma temaro de la Semajno, Marc Cuffez el Ostendo prelegis pri *Flandrio kaj Belgio: malfacila lando*, kaj Kristoforo Fettes pri *Irlando: historio kaj pejzaĝoj*.

Al esperantismo rekondukis Antonio Marco Botella per *La unuaj jaroj de Eo en Katalunio*, el sia 400-paĝa libro baldaŭ eldonota, kaj Giordano Moya, fide-la internedeisto, per *Esperanto kaj Mondunuigo*. Tutmondisma esti ankaŭ la temo de d-ro Wolfgang

Gunther: *Ekologio kaj Esperanto*.

Nepre laŭdinda estas la aktora ensemblo el Montpeliero *Go-Jo*, kiu tre amuzis per siaj skeĉoj, kaj menciinda la ĵusa trupeto el Parizo, sub la gvido de Rose Sanz.

La interkonaj vesperoj impresis gastronomie kaj folklore, interalie pro la fama ensemblo *Montjuic*, kun siaj kanzonoj el Havano.

Kvar ekskursoj celis la Hispanan E-Muzeon, la ĉampankelon "Esperanto" (marko oficiale registrita), ekspozicion de emajlaĵoj en Salou, kaj viziton en la monaĥejo-kastelo de Miravet kaj en la katedralo kaj kastelo de Tortosa. Do, ni riĉigis iom pli nian konon pri la bela kataluna tero.

Okazis debato pri *Kio pri la nova Eŭropo?* Verdire estis multaj opinioj pri la Eŭropa Konstitucio. Plena konsento estis nur pri la fakto, ke neniuj voĉdonos se antaŭe li ne povas legi la Konstitucian Traktaton.

E-kursoj zorgo de Salvador Aragaj kaj kontentiga libroservo plenumis sian rolon. (LSP)

### Ĉe niaj najbaroj : Provenco

La printempa kunveno okazos la 30an de aprilo kaj 1an de majo en St Raphaël . Prelegoj kaj kursoj sabate, ĝenerala kunveno dimanĉon matene kaj vizito posttagmeze . La 22an de majo estos pikiniko en Le Dramont, kaj la 12an de junio estos la tago de globludo (pétanque) en La Ciotat

### Zamenhofa tago en Avignon

La 5an de decembro, 8 personoj el Montpellier forveturis matene al Avignon por partopreni la 25an datrevenon de tiu festo, organizata de la loka asocio . En la « Souvine » ni estis ĉirkaŭ 40 geesperantistoj, kiuj de la 10a ĝis la 12a horo aŭskultis André Gente paroli pri Petrarko, kiu vivis en « Fontaine de Vaucluse » . André humore paroladis . Post la tagmanĝo, Hélène kaj Rose-Marie kantigis ĉiujn kaj la gelernantoj de la asocio ludis skeĉojn . Ni vidis ankaŭ bildstriojn pri Petrarko . Tri geesperantistoj el Montpellier kaj Lunel Viel, kiuj lernas E-on de nelonge, ne ĉion komprenis sed kaptis kelkajn vortojn, multajn ideojn, kaj tre ŝatis tiun etoson . Je la kvara ni diskuniĝis kaj « Ĝis venontjare ! » .



Langvedokanoj en Avignon



Josée legas poemon



Partoprenantoj de la Zamenhof-tago

### En Midi-Pyrénées : Toulouse

63 personoj kuniĝis por la tagmanĝo de la 12a de decembro (Z-tago) kaj deko plia aldoniĝis por la kultura programo posttagmeze . Dro A. Albault parolis pri la 50 datreveno de la Unesko-rezolucio de Montevideo . La Tuluza teatro-trupo ludis denove « Familia Etoso » (la trupo ludis unuafoje en Céret kaj ludos en Boulogne sur Mer) . Bogumil Wlodarski kaj la ensemblo de violonoj kaj violonĉeloj ankaŭ ĉarmis la publikon .

« Le bâton à palabre » ne estas afrika parolejo sed kafejo, kie esperantistoj kunvenas unufoje en la monato por diskuti en esperanto pri iu antaŭdecidita temo, en januaro ekzemple pri « Kian Eŭropon ni deziras ? » .

« Café linguistique » estas alia interesa iniciato, kiu jam funkcias en Strasburgo . Renkontiĝas ĉirkaŭ tablo homoj, kiuj deziras praktiki iun lingvon . Tia kafejo malfermiĝos en Tuluzo . Jam anonciĝis pluraj lingvoj ; estas konsiderata la ebleco aldoni esperanton . Loko : Mon Caf, place du Capitole ; datoj : mardon vespere 25/1, 1/3, 5/4, 24/5. Kontakti Jacques Caubel : 05 61 20 28 43 .

### Vinilkosmo :

Nia senlacigebla amiko Floreal Martorell pliriĉigis sian katalogon de kompaktdiskoj . Ĝi estas konsultebla ĉe <vinilkosmo.com>, kie vi povas rekte mendi aŭ aŭskulti registrojn . Jen kelkaj el la lastaj referencoj :

VKKD73 : « Mi estas » kun Ĵak Le Puil : protestkanzonoj, amkanzonoj, ŝerckanzonoj ;

VKKD74 : « Plaĉas al mi » kun Kaj Tiel Plu, la konata kataluna grupo. Mezepoko kataluna kaj okcitana ;

VKKD75 : « Rebelo Sono » kun Dolchamar...post longa silento nova produkto de tiu grupo nun konata en Finnlando


VKKD76 : « Nokto iĝas tag' » kun Ralph Glomp ;

VKKD77 : « La lumpiramido » kun Marcus Pengel kaj Jürgen Wulff, se vi volas malstreĉiĝi ;

VKKD78 : « Lokomotivo, rulu nun ! » kun Kajto, la fama nederlanda grupo, ilia kvina KD ;

VKKD79 : « Esperanta Voĉo » kun Vera Jordan, brazila komponistino kaj kantistino ;

kaj fine tute alispeca KD : VKKDR2 : «Lernu!» kun pedagogia kaj kultura materialo (lecionoj, ekzercoj, tekstoj, eltiraĵoj de libroj, vortaro, muzikoj, ludoj...) . Senpage, se vi aĉetas 2 aliajn KD-ojn .



## **Rencontre au Ministère de l'Éducation**

Après plusieurs demandes auprès du Ministère, une délégation d'Esperanto-France (Commission des affaires extérieures) avec son président, son secrétaire, un représentant de Jefe et un enseignant, a été reçue pendant 1h30 par un conseiller du ministre. Un rapport détaillé paraîtra dans le prochain numéro du « Monde de l'espéranto ». La délégation a explicité sa demande de l'option « espéranto au baccalauréat », facilement réalisable comme en Hongrie, a souligné que l'espéranto préservait la diversité culturelle et linguistique avec égalité de droits, contrairement au tout-anglais préconisé par le rapport Thélot. Elle a montré la valeur propédeutique de l'espéranto, qui encourage l'étude ultérieure d'autres langues et souhaité que soit expérimenté dans plusieurs écoles et collèges l'enseignement de l'espéranto.

Un dossier a été remis avec livres, revues, résolutions, études ; chacun a donné des exemples concrets et vécus sur

- le caractère naturel des bases de l'E°, la logique et la précision de construction des phrases,
- la rapidité d'acquisition et l'encouragement à la poursuite de l'étude de l'E°,
- le caractère propédeutique, y compris pour des élèves en difficulté,
- le sentiment d'égalité entre locuteurs de la langue internationale,
- le caractère hégémonique de la langue anglo-américaine et la discrimination dans des offres d'emploi,
- la valeur culturelle de l'E°, sa littérature originale et l'accès à toutes les cultures.

Le conseiller du ministre a donné des réponses claires et précises

- les propositions du rapport Thélot sur l'enseignement obligatoire de l'anglais « de communication internationale » ne sont pas retenues par le ministère ;
- le plurilinguisme reste la ligne de conduite, le ministère n'est pas responsable du choix des parents ;
- chaque langue a une valeur propédeutique ;
- le ministère souhaite simplifier le baccalauréat, l'ajout d'une nouvelle option ne peut être retenue ;
- le ministère ne peut accepter d'expérimentations sur les élèves ;
- l'espéranto n'a ni culture ni histoire ;
- le ministère ne prendra pas en considération des projets sur l'E° ;
- l'espéranto est quelque chose de très louable, les espérantistes doivent se limiter au monde associatif et ne pas interférer dans le système éducatif.

La délégation a pris congé en remerciant le conseiller de ses propos très clairs.

*NDLR : ce qui précède est un essai de résumé d'un texte beaucoup plus long en espéranto. Prière de se reporter au « Monde de l'espéranto » pour la version officielle. Le compte-rendu a été discuté le 20 janvier par le comité d'Esperanto-France, les conclusions vous seront communiquées dans le prochain numéro.*

*La position du ministère doit nous inciter à repenser notre argumentation et notre action, ne faut-il pas :*

- continuer à demander l'option espéranto au baccalauréat, en faisant signer la pétition aux jeunes et à leurs parents ?
- persévérer dans la création de cours dans les établissements scolaires, comme il est permis en dehors des horaires ?
- avoir recours à une action commune auprès des responsables politiques (députés, députés européens), toutes les associations d'espéranto et toutes les fédérations se mobilisant ensemble (voir congrès de Boulogne) ?
- « creuser notre sillon » sans se soucier du Ministre de l'Éducation, qui n'est pas éternel ?
- penser à une autre voie comme celle d'EDE ?

*La parole est aux lecteurs ; nous ferons paraître leurs (brèves) interventions, s'ils le souhaitent.*

## **Réunion régionale de DELNE :**

Elle a eu lieu à Toulouse le 21 novembre, en présence d'une trentaine d'espérantistes.

Le bilan a porté principalement sur la campagne pour les élections européennes du 13 juin. La région sud-ouest, qui comprend 8 départements, a obtenu 3687 voix, soit 1,5% des votants. Le résultat est très honorable, vu le manque de crédits et le fait que plusieurs départements n'ont pu être contactés et n'ont pas reçu de bulletins de vote. Dans les autres départements, les bulletins de vote n'ont pu être envoyés aux votants, pour être seulement déposés dans les bureaux de vote. Les résultats varient donc suivant les départements mais tous les départements (de France aussi) ont eu des voix pour l'espéranto. Le rapport financier a été adopté à l'unanimité. DELNE (nom de l'association régionale) devient EDE (Europe Démocratie Espéranto), nom national de l'association.

La transformation de EDE en parti politique est rejetée à l'unanimité (une voix pour, une abstention).

Actions à mener : ne pas laisser retomber l'euphorie de 2004, continuer de faire connaître l'espéranto (lettres aux maires et aux élus, vente de bandes adhésives pour les véhicules).

Renouvellement du Conseil d'Administration pour un an : président, Thierry Saladin ; vice-président, Jacques Morin ; secrétaire, Claudie Demongeot. Les participants se sont séparés, conscients du travail accompli et résolus à poursuivre cette tâche.

(D'après rapport de Dalia et Mado)

**Réinsertion et Espéranto :** a tenu son assemblée générale annuelle le 15 janvier. Nous regrettons que, par la faute du retard de ce numéro, l'information parvienne trop tard, mais nous ferons paraître volontiers les décisions. L'espéranto a été présenté depuis 8 ans à 11000 élèves de la région mais R.E. constate que chaque année tout est à refaire et il est envisagé de suspendre la prospection dans les établissements scolaires et de changer de cap au-delà de 2008. La cotisation à l'association est de 16 E, les dons sont les bienvenus (réduction fiscale de 60%).

Adresse : Résidence Ste Thérèse, Appt 70, 968 Avenue du Père Soulas, 34090 Montpellier Tél : 04 67 91 01 96  
[apsikel1997@yahoo.fr](mailto:apsikel1997@yahoo.fr) <http://reinsesperanto.multimania.com>

### • Turismo

Sur la tria paĝo estas kelkaj sugestoj de E-rende-vuoj. La listo kompreneble estas senfina. En Marto ekzemple elstaras du aranĝoj, la azia kongreso en Nepalo (4-8/3) kaj la 21a PSI, Printempa Semajno Internacia, en Germanio apud Giessen (21-28/3). Jen kelkaj aliaj proponoj de « Esperantotur » kun indiko cifere de la monato: Aŭstralio (1), Kongo (2-3), Irano (4), Ukrainio (5), Ĉinio (5), Maroko (8), Bulgario (8), Mongolio (8), Usono (10), Tajlando-Laoso-Kamboĝo-Vjetnamio (11-12), kaj pluraj vojaĝoj ĉirkaŭ la mondo (11, 12), Esperanto, ŝlosilo de la mondo. *Kompreneble pri la menciitaj aranĝoj, detaloj estas haveblaj de SFS.*

□

### • Reta gvidlibro : « Turismo kaj Esperanto »,

por ebligi al vojaĝantaj esperantistoj paroli E-on. En la reta gvidlibro aperos ĉiuj lokoj (hoteloj, kampadejoj, feriejoj, komercejoj, muzeoj, turismoficejoj, kunvenejoj, ktp), kie esperanto estas parolata. La Havra esperantista grupo alvokas al la helpo de ĉiuj esperantistoj por realigi tiun projekton. Kontakti Bernard Dufresne 14, Rue de Saint Aignan 76600 Le Havre <http://esperanto-lehavre.org>

□

• **Gangalo** : ne plu necesas prezenti tiun grandan interretan portalon. Pro la kreskanta vizitataro (de averaĝe 1500 vizitantoj tage al pli ol 5500 ekde la komenco de januaro), la administracio de Gangalo devis rearanĝi siajn dosierojn ĉe la servilo. Nun ĝi povos proponi pli da servoj kaj taŭge ricevi ĝis 10 000 vizitantoj tage.

□

• **Lingva problemo** : Rikardo Czarniecki, pola deputito en la Eŭropa Parlamento, skribas en sia informilo, ke male al la promeso sendi ĉiujn dokumentojn por Varsovio en la pola en 2004, Bruselo transsendis por la pola registaro 4430 dokumentojn en la franca kaj la angla. « Tiu situacio ne ĝojigas min », diras la deputito (kontakt@RyszardCzarniecki), kiu estas jam konata post intervjuo pri Esperanto ĉe Radio Polonia por aŭskultantoj en aliaj landoj.

□

• **Lingva problemo** : Bernard Cassen, konata en la movado «Attac» kaj fakulo pri la angla lingvo (li estas aŭtoro de pluraj libroj kaj metodoj) proponis en « Le Monde diplomatique » alternativon al la hegemonio (« tiraneco » laŭ la titolo de la artikolo) de la angla/usona lingvo. Li proponas, ke parolantoj de la diversaj latinidaj lingvoj studu aŭ progresu en la lingvoj de la aliaj grupanoj. Tiel en 2025, kompare kun 1561 milionoj da Ĉinoj, 1048 milionoj da angloparolantoj, estus tria bloko kun pli ol 1300 milionoj da uzantoj de latinidaj lingvoj.

*La kompleta teksto estas havebla de SFS.*

Ĉu la ekzisto de pluraj lingvaj blokoj, teorio jam proponita de Stalin, estas vera solvo por la monda paco? Kial do B. Cassen eĉ ne mencias esperanton, pri kiu li certe aŭdis?


*Pri la lingva problemo legu ankaŭ sur paĝo 17a asertojn de la lingvisto L-J. Calvet.*

### Surprizo dum ferioj :

Lastan aŭtunon ni decidis forflugi dusemajnon al la suno kaj elektis la grekajn insulojn. Ege plaĉis al ni la insuloj Mykonos, Paros kaj Santorini. La lasta, eksvulkano, certe estas la plej surpriziga. Ni rezervis ĉion de nia hejmo; nur unufoje ni devis prokrasti vojaĝon al la sekvanta insulo pro la vento « meltem », kiu malhelpis la modernajn surmarajn transportilojn cirkuli. De Paros ni vizitis la insulon Naxos. Tie atendis nin surpriz(eg)o. Kutime, kiam ni vojaĝas eksterlanden, ni kontrolas, ĉu estas esperantistoj(UEA-jarlibro, Pasporta Servo), kontaktas ilin kaj kutime la renkontoj estas pliriĉigaj por ĉiuj. Ankaŭ eksterlandaj esperantistoj ĝojas renkonti aliajn homojn kaj montri tiel al siaj proksimuloj kaj konatoj, ke Esperanto vivas. Malfeliĉe ni trovis neniun adreson kontakteblan sur tiuj insuloj. Do, ni rezignis pri la ideo.

Promenante laŭlonge de la marfronta kajo, ni subite haltis. Antaŭ ni staris «restoracio Esperanto», kun la vorto plurfoje kaj grandlitere ripetita. La estro forestis: estis dimanĉo kaj siesto ekzistas por iuj. La kelnerino sciis, kio estas esperanto, sed ne parolis ĝin. Sur la kajero kun la menuoj estis trafaj klarigoj en la greka kaj la angla pri esperanto. Poste sur ĉiu paĝo estis diversaj pladoj kaj por ĉiu kategorio estis la vorto esperanto, ekzemple estis krespo esperanto, pico esperanto, glaciaĵo esperanto, ktp. Ni ne gustumis ĉiujn, nur trinkis frostan kafon kaj « kitron ». Tio estas la likvoro de cedrato kaj antaŭ unu jarcento ĝi famigis la insulon Naxos, nun ĝi preskaŭ ne plu estas produktata. KREDU MIN, TIU « kitron » de la restoracio Esperanto speciale bongustis, eble sed ne nur pro la nomo de la loko! Ĉi-poste du fotoj de la restoracio. Verdaj integristoj(homoj, kiuj nervoziĝas, kiam ili vidas vorton en la angla lingvo) bonvolos pardoni min.

J. Hénin



Restoracio-picerio  
"Esperanto"  
sur la greka insulo  
Naxos.  
Legeblas la vorto  
"esperanto"(x)

**Proposition de texte :**

*Notre ami Henri Vigne (Alès) pense que les Français qui se trouvent avec des problèmes de communication à l'étranger ou les étrangers chez nous (migrants, touristes, etc), pourraient être sensibles à l'argumentation qui suit. Ce texte occupant une demi-page, sur la même feuille pourraient se trouver les versions en quatre langues différentes (déjà sont prêtes les versions en anglais et en espagnol). Que pensez-vous de sa proposition, du texte ? Qui pourrait aider pour d'autres langues ?*

Bonjour,

Vous venez d'arriver dans ce pays. Vous connaissez la langue, c'est parfait. A défaut, vous allez vous trouver sans cesse avec des compatriotes, qui eux la connaissent et seront vos interprètes chaque fois que ce sera nécessaire. Si tel n'est pas votre cas, vous allez vous trouver comme sourd(e) et muet(te). Pour quiconque, c'est là un handicap énorme.

Depuis 1887, il existe un moyen pour communiquer entre gens de langues différentes, une « langue-pont ». C'est un modèle de facilité, de clarté, de précision. Sa grammaire tient en 16 règles invariables. Elle est basée sur un système de plus de 40 affixes (préfixes et suffixes). Sa seule difficulté est de la pratiquer pour apprendre les racines, toutes courtes et faciles à mémoriser. Ainsi, dès que je connais « bel... », par exemple, avec mes 16 règles et mes 40 affixes je vais pouvoir écrire et dire tous les mots ayant trait à la beauté... et à la laideur : substantifs, adjectifs, adverbes, verbes, à tous les temps et tous les modes, absolument tout.

Aujourd'hui, ici dans cette ville, il y a plusieurs autochtones, qui pourraient vous accueillir, vous accompagner, et vous servir d'interprètes.

Les personnes adeptes de cette langue-pont communiquent entre elles et se rencontrent en permanence (par internet de plus en plus).

Merci de votre attention. Il y aurait beaucoup à dire encore, mais, s'il vous plaît, dès votre retour chez vous, renseignez vous, gratuitement et sans aucun engagement bien entendu, auprès de

France-Espéranto 4bis, Rue de la Cerisaie 75004 Paris Tél. 01 42 78 68 86 [info@esperanto-france.org](mailto:info@esperanto-france.org)

**Europe 1 et le problème des langues :**

A trois reprises ces dernières semaines, la station de radio Europe 1 s'est signalée par des commentaires douteux sur l'espéranto, non seulement de la part de ses invités mais aussi de certains de ses journalistes.

Le 1<sup>o</sup> octobre, Jacques Pradel, journaliste très connu pour ses émissions matinales, recevait l'ineffable linguiste L-J. Calvet (ineffable, car ses propos sur l'espéranto sont toujours les mêmes et toujours aussi peu fondés).

Amené à parler de l'espéranto par plusieurs questions d'auditeurs, notre linguiste rappelait a) qu'il est artificiel et inventé de toutes pièces, b) qu'il n'a pas marché et ne marche pas, c) qu'il est aussi difficile que les autres langues pour un Arabe ou un Chinois... Le journaliste n'a pas trouvé mieux que d'acquiescer à ces affirmations. Début janvier, lors d'une autre émission avec Axel de Tardé, « Chroniques de l'info », le sujet était : l'anglais doit-il devenir la langue de l'Union européenne ? Le journaliste a bien montré les frais de traduction dans l'Union, l'impossibilité de traduire de et dans toutes les langues, la question d'équité qui se posait vis-à-vis des langues minoritaires, les résistances au tout-anglais, le caractère obsolète du latin. Un bref exposé convaincant sauf que le journaliste s'est cru obligé de faire un commentaire très négatif sur l'espéranto, « cette langue qui n'appartient à personne et que personne ne parle d'ailleurs -c'est là le problème ». Voilà comment, par une phrase insidieuse, on peut détruire l'image de l'espéranto auprès des auditeurs.

Dernièrement, notre ineffable linguiste était de nouveau invité dans une autre émission (peut-être a-t-il pris un abonnement, en exigeant des indemnités réduites ?). Devinez les arguments employés, exactement les mêmes que ci-dessus. Bis repetita placent ! Il est vrai que, lorsqu'on est convaincu, on risque de se répéter. Rires des journalistes dans les coulisses. Pour faire bonne mesure, il a ajouté que dans un congrès récent à Pékin il y avait un millier de Chinois sur un milliard trois cents millions de Chinois (bien sûr, pas un mot sur l'autre millier de congressistes d'une soixantaine de pays). D'après L-J. Calvet, l'euro-panto est compris de tous dans les couloirs de Bruxelles.

Quand on vous disait que le problème des langues n'existait plus...


Bien sûr, il y a eu des réactions aux trois émissions citées. Le rebat-servo a bien fonctionné. Un peu tard quand le mal est fait, c'est vrai, mais la diversité des courriers a dû convaincre les responsables d'être plus prudents à l'avenir. Espérons que notre linguiste prendra le temps de vérifier ses dires.

Bien sûr, il ne suffit pas de faire des reproches. Des documents, brochures, etc, ont également été adressés à la station, ainsi que la suggestion d'inviter des interlocuteurs de la trempe de Georges Kersaudy ou Umberto Eco.

Rendez-vous à la prochaine évocation du problème linguistique en Europe... sur Europe 1 !

J.H.

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10



HORIZONTALE

- I) - Kuracist(o), ekzemple.
- II) - Truit(o).
- III) - Kruciferac(o) / Ina mallongig(o).
- IV) - Orpalatulo.
- V) - s : Malĝentilaĵo / Malorde hodiaŭa / s : Floro.
- VI) - Pli ol trankvil(o).
- VII) - Muz(o) / ! ousej
- VIII) - Kaŝita insekto... / Duonrido.
- IX) - Persona kultur(o) / Franca ĉefurb(o).
- X) - Premsentiv(a) / Veda dio .

s : sone

Solvo de la lastaj krucvortoj

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10



VERTIKALE

- 1) - Filozofi(o).
- 2) - Fizika grando.
- 3) - Militŝip(o) / Magneta fort(o).
- 4) - Amerikan(o).
- 5) - s : Linaĵo / Azia poem(o) / s : Poemo.
- 6) - s : Vimomo / Sovaĝa lok(o).
- 7) - Eksa balta urb(o).
- 8) - Fama kurieristin(o) / Tibiparto / s : Azia monunuvo.
- 9) - Aglomer(i) / Plifortigi.
- 10) - Senkora egipta dio / Egipta dio.

BOPARO

LES NOUVEAUX BEAUF S VONT-ILS D'ECOUVRIR L'ESPÉRANTO ?



« Le Canard enchaîné » (24-11-2004)

SFS 172a aperos fine de aprilo, post la internacia kaj interesocia kongreso de Boulogne-sur-Mer (Paska semajnfino) kaj la federacia kongreso en Lunel de sabato, la 9a de aprilo 2005 .  
 Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis **la 10a de aprilo** al  
 Jean Hénin – Beauregard, Route de Montcayroux 48500 La Canourgue  
 Telefono/telekopio : 04 66 32 86 36 [jean.henin@wanadoo.fr](mailto:jean.henin@wanadoo.fr) Anticipan dankon !